



## Venontaj eventoj

👉 **Hodiaŭ** 👈

- ★ **2:00 ptm:** Fulm-leciono pri ĵonglado! Steĉjo instruos en la korto antaŭ niaj loĝejoj.
- ★ **7:30 ptm:** Japanaj kantoj kun Yoŝiki en la komuna salono (Cuzco).

### Ĵaŭdo

- ★ **2:00 ptm:** Steĉjo kaj Meja anoncos konkurson pri trezorserĉado
- ★ **7:30 ptm:** Preparsesio por la KER-ekzamenoj

### Vendredo

- ★ **1:30 ptm:** Ekskurso: akvario Birch
- ★ **7:30 ptm:** Tabul-ludoj en la komuna salono

### Sabato

- ★ **10:00 atm:** Ekskurso: Urbocentro de La Jolla kaj la golfeto La Jolla Cove

### Dimanĉo

- ★ **11:00 atm:** Ekskurso: plaĝo Black's Beach
- ★ **ptm:** Ekskurso: fajraĵoj en La Jolla. La spektaklo komenciĝos je la 9-a ptm, sed ni ekiros pli frue, je la 7-a.

## La NASKa Fasko

**Redaktejo:** Asante n-ro 116  
<nask.esperanto@gmail.com>

La NASKa Fasko aperas lunde – vendrede dum la kursaro. Kutime ĝi aperas tagmeze. Se vi ne ricevas ĝin post la matenaj klasoj aŭ en la manĝejo, prenu ekzemplon el la skatolo kiu troviĝas sur la fenestro de la redaktejo.

Ni aŭde atendas viajn artikolojn, fotojn, desegnaĵojn, bildstriojn, poemojn, viajn am-leterojn... preskaŭ ion ajn! Memoru, la Fasko estas taggazeto **por vi kaj pri vi**: viaj kontribuajtoj igas ĝin interesa. Do nepre kontribuu!

Se vi ne sentas vin komforta pri verkado, ne timu; ni volonte helpos vin korekti kaj poluri. Serĉu unu el niaj lingvo-helpantoj; sur siaj nomŝildoj ili portas specialajn glumarkojn kun rideto (☺) – kaj ili ridetante helpos vin korekti, poluri, kaj plibonigi vian verkon. Kiam la verko pretas, sendu ĝin per retroŝto al la adreso supre, aŭ simple portu ĝin piede al la redaktejo.

# Lerte lernu ĵete ĵongli



Antaŭ proksimume 15 jaroj, iel envenis en mian kapon la ideo, ke mi lernu ĵongli. Post periodo da ĉagreno kaj pilkofaligado, mi sukcesis ĵongli, kaj finfine ĵonglado fariĝis agrabla kaj amuza ŝatokupo. Hodiaŭ je la 2-a ptm, mi instruos al vi bazan manieron ĵongli per tri pilkoj. Ĉiuj estas tre bonvenaj, eĉ se vi volas nur spekti kaj kuraĝigi la aliajn NASKanojn.

Antaŭ ol ni venis al Kalifornio, mi sendis al vi mesaĝon en kiu mi petis ke vi paku ĵongleblajn pilkojn. Se vi do havas pilkojn, bonvolu kunporti ilin hodiaŭ. Tamen, se vi ne havas pilkojn, ankaŭ vi povos ĵongli: mi trovis sufiĉe multajn malnovajn tenis-pilkojn, kiujn ni povos uzi.

— Steĉjo

## Praktika parolado

de Ĝeremio

Dum kongresoj kaj kursaroj kiel NASK, oni rapide lernas ke legi/skribi Esperanton estas iamaniere malsimile ol paroli/aŭskulti ĝin. Jen kelkaj utilaj vortoj kun anglaj tradukaĵoj por helpi vin babili kiel denaskulo:

Nu...	Well...
Do	So, then, therefore
Kaj tiel plu	Et cetera
Ĉu (vere)?	Really?
Tute ne!	Not at all!; no way!
Ĝuste	Yup, right
Eble	Maybe
Mojose!	Cool!
Alivorte...	In other words...

## ial a anka stoneto?

de Vido

Preskaŭ ĉiuj jam scias ke blanka bastoneto signas blindulon, ĉu ne? Sed mi vin rigardas kiam vi alparolas min kaj mi legas la NASKan Faskon kaj la ŝildojn de la bushaltejo – ŝajnas ke mi ne estas blinda, ĉu ne?

Fakte, mia apopleksio kaŭzis du strangajn afliktojn. La simpla estas iom da ataksio. Iam muskoloj en mia maldekstra brako aŭ kruro, mano aŭ piedo spasmas aŭ kramfas, aŭ iras ne precize tien, kien mi intencis. Sen bastoneto aŭ alia apogilo,

eble mi falus aŭ alimaniere vundus min. Blanka bastoneto ne ĉiam signas blindulon; foje, blanka bastoneto estas simple bastoneto.

La pli stranga aflikto nomiĝas “maldekstra-flanka malatento”. Miaj okuloj ja funkcias, sed aferoj ĉe mia maldekstra flanko ne interesas mian cerbon. Estis terura tago kiam mi povis vidi mian maldekstran ŝultron kaj manon, sed nenion pri la brako kiu alligas ilin.

Alia ekzemplo: ofte mankas al mi la maldekstraj partoj de vortoj aŭ frazoj. Laŭ mia legado de la ekrano, lundon mi ĉestis la “duko” de “ASK2010”, kie mi eklernis ke la lingvo-laboratorio havas “brokolekto”. Stranga afero! Ĉu mi eĉ estis en taŭga loko?

(Persono povus havi malatenton pri ajna flanko. Sed – mi ne scias la kialon – cerbaj vundoj estas plej ofte ĉe la dekstra flanko (kiel la mia), kaj memoru ke ĉiu cerba duon-sfero apartenas al la kontraŭa korpa flanko – iom stranga aranĝo, sed normale ĝi ne tro gravas.)

Do mi povas facile karamboli kun pordoj aŭ mebloj aŭ treti infanojn kaj bestojn. Pro tio mi ne plu veturas, ĝis kiam mia vidado (fakte, mia cerbo) espereble renormaliĝos. Mi ne estas vere blinda, sed mia vidado estas iom difektita. Eble vi kredas ke mi vidas vin kiam mi vidas nenion.

Do mia blanka bastoneto helpas min stari kaj marŝi, kaj avertas vin ke tiuj agoj estas malpli facilaj ol vi eble supozas.